

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

8) *Ché schiava di Roma Iddio la creò!* La plej malfacile tradukebla vorto de la itala al Esperanto.

La plej malfacile tradukebla vorto de la itala lingvo al Esperanto estas laŭ mi "che". Ni ne multe teoriumu sed vidu ekzemplojn. Estos tuj klare, ke oni devas pensi antaŭ ol traduki, kaj kompreni la signifon de "che" en tiu aparta situacio. Pensi estas malfacile, sed ankaŭ kompreni la signifon de "che" por italoj iĝas pli kaj pli malfacile.

Ekzistas du grandaj signifo-grupoj: **KE** kaj **KIU/KIUN/KIUJ/KIUJN** sed ankaŭ multaj aliaj, kiel ni vidos poste.

Mi utiligis la retan vortaron de De Mauro, <http://www.demauroparavia.it/>, por la ĝenerala kadro kaj por multaj ekzemploj en la itala. La kap-vorto "che" en la Vocabolario italiano-esperanto de Carlo Minnaja estas same elĉerpa pri ĉiuj uzoj de "che".

Mi mem elpensis kelkajn ekzemplojn kaj kelkajn prenis el konataj operaj aŭ literaturaj tekstoj.

KE

Kunligo inter prepozicioj, foje kun plia signifo: *M'hanno detto che Beppe va soldato.* = Oni diris al mi, ke Joĉjo soldatiĝas; *Non lasciate che passi l'età!* = Ne lasu/ne permesu, ke la aĝo foriru/os. *Il cor mi dice che trovarlo dobbiam.* = Mia koro diras, ke ni devas trovi lin.

Kunligo plus tiel/tiom: *Recita che pare un attore nato. Voglia il cielo che smetta di piovere.* = Li aktoras tiel, ke li ŝajnas vera aktoro. Dio volu, ke ĉesu pluvi. *È tanto irritato che temo possa fare una pazzia.* = Li estas tiel ĝenata, ke laŭ mia timo li povus fari frenezaĵon. *È indaffarato al punto che non riesco più a parlargli* = Li estas tiom okupata, ke mi ne plu sukcesas paroli al li.

Kunligo plus "kiam": *Vado a lavorare che è ancora notte fonda. Arrivò che era estate. È un'ora che ti aspetto.* = Mi iras labori, kiam ankoraŭ estas profunda nokto. Li alvenis, kiam estis somero. Estas unu horo de kiam mi atendas vin. *Finito che ebbe di leggere, stette lì alquanto a pensare* (Manzoni).

= Post kiam li finlegis, li restis tie iom da tempo, pensante. *L'estate che partii. Non passa giorno che non lo incontri.* = La somero, en kiu mi foriris. Ne pasas tago, dum kiu mi ne renkontas lin. *Ogni volta che esco, piove.* = Ĉiufoje, kiam mi eliras, pluvos.

Kunligo plus "pri kiu", "en kiuj": *Questa è l'amica che ti dicevo. Non si fanno carico de' travagli in che mettono un povero galantuomo* (Manzoni). = Ĉi tiu estas la amikino, pri kiu mi parolis al vi. Ili ne zorgas pri la problemoj, en kiujn ili metas bedaŭrindan honestulon.

Aliaj okazoj: *Che si sappia, non dovrebbe accadere nulla di grave* = Tiom kiom oni scias, nenio serioza devus okazi. *Insisteva che salissi.* = Li insistis, (por) ke mi supreniru al lia apartamento. *Che non si faccia più vedere. Che il cielo ce la mandi buona! Che gli pigli un accidente! Che provi pure se vuole* = (Mi deziras ke) li ne plu montru sin. (Mi deziras ke) Dio igu nin sukcesis. (Ke) li estu frapita de malbonaĵo. Li provu, se li tion deziras.

KIU, KIUN, KIUJ, KIUJN

Kiam la itala frazo povas enhavi "*il quale*", "*la quale*", k.t.p. anstataŭ "*che*". Temas kaj pri demandoj kaj pri rilataj kunligoj inter frazoj.

La pioggia che cade. Il libro che ho letto. I ragazzi che ho appena incontrato. Madamina, il catalogo è questo delle belle che amò il padron mio, un catalogo egli è che ho fatt'io = La pluvo, kiu falas. La libro, kiun mi legis. La knaboj, kiujn mi ĵus renkontis. Sinjorino, ĉi tiu estas la listo de la belulinoj, kiujn mia mastro amis, ĝi estas listo, kiun mi faris.

Atentu: ne ĉiam facilas distingi kaj kompreni la signifon: *Carlo è nell'altra stanza che legge. È Giorgio che ha telefonato, non Marco, è con lui che devi parlare* = Karlo estas en la alia ĉambro. Li legas./Karlo, kiu legas, estas en la alia ĉambro. Temas pri Ĝorĝo, kiu telefonis, ne Marko, kun li vi devas paroli.

Demanda adjektivo: *Che treno prendi? Dei, che cimento è questo?!* = Kiun vagonaron vi trafos? Ho dio, kiu danĝera provo estas ĉi tiu?!

KIO

Demanda pronomo, kio, ofte kune kun cosa: *Che (cosa) fai?, Che (cosa) è stato?, E che degg'io guardar?* = Kion vi faras? Kio okazis/Kio estis tio? Nu, kion mi rigardu?

Foje ĝi estas demanda vorteto kun subkomprenata verbo: *Che? E che? O che? Ma che?* = Kio/Kion? (depende de la subkomprenata verbo; Kio (estas)?)

Kion vi volas?; foje ĝi fortigas demandojn: *Che? Vuoi già uscire? E che? Hai paura?* = Kio okazas? Ĉu vi jam volas eliri? Ĉu eble vi timas?

Che più = kio alia, kio plia, kio cetera.

Foje la signifo estas "io": *Avere di che mangiare. Non c'è di che rallegrarsi. Non c'è di che* = Havi ion, el kio vivi, Ne estas io, pri kio oni ĝoju. Ne estas io dankinda.

Il che signifas la qual cosa: *Non è venuto all'appuntamento, il che mi preoccupa.* = Li ne venis al la rendevuo, kio min zorgigas. *Dopo di che me ne andrò* = Post kio/tio mi foriros. En aliaj okazoj *Il che signifas tutto: il che e il come, voglio sapere il c. e il come di tutta la faccenda* = ĉio, ĉiuj detaloj, mi volas scii ĉiujn detalojn pri la afero.

Un che signifas io: *C'era nel suo sguardo un che di beffardo* = estis en lia rigardo io defie primoka; *Un certo non so che* = io, kion mi ne scias/kion mi ne komprenas.

Checché signifas "Kio ajn": *Checché succeda, parto ugualmente. Checché tu ne dica, non mi convinci* = Kio ajn okazos, mi same foriros. Kion ajn vi diras, vi ne konvinkas min.

KIA/KIEL

Che ragazzo simpatico! Che bellezza! Che strane idee! Che magnifico sole, stamattina! Che barba! Che noia! Che palle! Che bel rimedio ti voglio dar! = Kia/kiel simpatia knabo! Kia belo! Kiaj/kiel strangaj ideoj! Kia/kiel mirinda suno ĉi-matene! Kia enuo! Kia tedo! Kiel granda enuo! Kian/kiel belan kuracilon mi volas doni al vi!

Atentu pri: *Stupido, che non sei altro!* = Stulta! Vi ne estas io alia! Origine eble ĉi tie "che" estis komprenata kiel "perché".

KROM

Kune kun *altro, altri*, ofte subkomprenataj: *Non c'è (altri) che lui. Non resta (altro) che rassegnarsi. Non ci mancava (altro) che questa* = Estas neniu (alia) krom li. Oni ne povas fari ion alian, ol rezignacii. Nenio alia mankis krom ĉi tio/Nur ĉi tio mankis/Jen la mankanta problemo.

Kompara che

Atentu pri la traduko en vere komparaj frazoj.

E' finita meglio che non credessi. Faccio più velocemente che posso. Preferisce leggere che uscire con gli amici = La afero finiĝis pli bone, ol mi pensis. Mi finfaros tiel rapide, kiel mi povos/kiel eble plej rapide. Li preferas legi ol eliri kun la amikoj.

E' un'occasione più unica che rara. Dicevo più per scherzare che per offendere. E' più gentile con te che con me. = Temas pri okazo pli sola ol malofta. Mi parolis pli por ŝerci ol por ofendi iun. Li estas pli ĝentila kun vi ol kun mi.

La cosa interessa tanto me che voi = La afero interesas vin kiel min/vin same kiel min. *E' più gentile che mai. Sono più che sicura.* = Li estas pli ĝentila ol iam ajn/tre ĝentila. Mi estas certega.

En plurvortaj esprimoj

Ammesso che, posto che, a patto che: Posto che accetti, lo invitiamo. Potrai uscire a condizione che tu finisca di studiare = Se li akceptos, ni invitos lin. Vi rajtos eliri, kondiĉe ke vi finlernos.

Eccetto che, tranne che, salvo che, a meno che, se non che: Lo chiederei a tutti tranne che a lui. Verrei lunedì a meno che tu abbia altri impegni. Sembrava addormentato se non che di tanto in tanto apriva un occhio. = Mi petus ĉiujn krom lin. Mi venus venontan lundon, krom se vi havas aliajn sindevigojn. Li ŝajnis dormi, sed tamen de tempo al tempo malfermis la okulojn.

Prima che, dopo che, ogni volta che, kaj ceteraj: Vieni a salutarmi prima che tu parta. Ogni volta che esco piove. = Venu saluti min, antaŭ ol vi foriros. Ĉiam. Kiam mi eliras, pluvos.

Sia che, o che: Sia che tu voglia sia che tu non voglia. Che piova o che ci sia il sole. = Kaj se vi volas, kaj se vi ne volas. Kaj se pluvos, kaj se estos suno.

Kromaj okazoj

A che?: A che pur versi de gli occhi tristi un doloroso fiume? = Kiucele? Kiucele vi verŝas el la malgajaj okuloj dolora rivero?

Che è che non è: Stavamo parlando tutti insieme e, che è che non è, quei due hanno iniziato a litigare = Abrupte, senkiale. Ni ĉiuj estis parolantaj kune, kaj abrupte tiuj du ekkverelis.

Che so io: Aveva tutte le qualità era brava, bella, gentile e che so io. = Kaj ĉio plia, kaj tiel plu. Ŝi havis ĉiujn kvalitojn, ŝi estis lerta, bela, afabla kaj tiel plu.

ĈAR

Le porga la chioma, ché schiava di Roma Iddio la creò. = Ĝi (la venko) kliniĝu antaŭ ĝi [Italujo], ĉar Dio kreis ĝin [la venkon] sklavino de Romo. *Vigili leggete ché vi fa bene.* = Urbaj policistoj legu, ĉar tio utilas al vi (el tute lastatempa reta tag-libro). *Datemi il redattore della rivista ché gliene voglio dire due.* = Mi renkontu la redaktanton de la revuo, ĉar mi volas diri al li kelkajn "afablaĵojn"/kritiki lin. Duba okazo: *Sono felice che tu sia venuto* = Mi estas kontenta ke/ĉar vi venis.

Prae en la itala oni uzis *ché* ankaŭ en la signifo de demando *perché*. "*Padre mio, ché non m'aiuti?*" = Patro mia, kial vi ne helpas min? (en Dante).

Atentu: Nuntempe ofte oni skribas simple e kaj ne *é*, laŭ la laŭgrada malapero en la itala de supersignoj.

Dante (aŭ la presantoj de Dante) certe skribis kun supersigno: *...mi ritrovai per una selva oscura / ché la diritta via era smarrita.* = ...mi fine estis en malhela arbaro / ĉar la ĝusta vojo estis perdita. Ankoraŭ en la Iliado ni trovas tion: *ché gli pose nel cor questo consiglio Giuno la diva dalle bianche braccia.* = ĉar Junono, la diino kun blankaj brakoj, metis en lian menson, ĉi tiun konsilon.

Fina amuzo

Ni faru serion de frazoj preskaŭ samaj sed kun malsama *che*:

Le porga la chioma, ché schiava di Roma Iddio la creò. = Ĝi (la venko) kliniĝu antaŭ ĝi [Italujo], ĉar Dio kreis ĝin [la venkon] sklavino de Romo.

Io penso che schiava di Roma Iddio la creò. = Mi opinias, ke Dio kreis ĝin sklavino de Romo.

Mi chiedo, che schiava di Roma è quella, la vittoria o sua sorella? = Mi demandas min, kiu sklavino de Romo estas tiu, ĉu la venko aŭ ŝia fratino?

Mi compiaccio: che schiava di Roma Iddio creò! = Mi kontrentas: kian/kiel (belan) sklavinton de Romo Dio kreis.

Ma che schiava e schiava? Ma che schiava d'Egitto? = Kial vi parolas pri sklavino? Ne temas pri sklavino!

Che Dio già la creò schiava di Roma? Che/é senno' la potrebbe creare schiava di Milano. = Ĉu Dio jam kreis ĝin sklavino de Romo? Ĉar, se ankoraŭ ne, li povus krei ĝin sklavino de Milano.

La demando *che* estas nobeligita de la fama frazo de Balilla: "*Che l'inse?*" = Ĉu mi komencu (ĵeti la ŝtonojn al la aŭstroj)?